



TEA-BULTENO

6^A JARO

JANUARO-FEBRUARO 2003

NUMEROJ 1-2

Bonan Novan Jaron!

Ĉu la ĵus startinta 2003^a jaro estos pli fruktodona, pli sukcesa, pli malavara je bonaĵoj ol la antaŭa, tion ni povos ekscii aŭ prijuĝi nur kiam ni atingos ties finan tagon, sed se veras tio kion diras fama proverbo: “Komenco bona, laboro duona”, tiam ni ja rajtas laŭte diri: “Jes, ĉi tiu jaro certe estos la plej favora el ĉiuj pasintaj!”

Nu, kial tia firma aserto? Tuj respondite: baldaŭ nia kara TEA translokiĝos en sian novan sidejon, en la prestiĝajn ejojn ĉe la Germana Bonfara Instituto. Niaj lokaloj konsistos el ĉambroj, en kiuj trovos lokon sekretariejo, laborejo, biblioteko, studejo, arkivo, ktp. La nova adreso estas *Via Coroneo 15*. Kion ni povus deziri pli? Nenion alian! Nura plia deziro restas, ke en la nova jaro vi ĉiuj, karaj geklubanoj, konkrete montru vian alligitecon al TEA per pli nombra partopreno en la asocia aktivado, per via pli konstanta engaĝiĝo en agado de asocio, kies nura celo estas pluvivi por sukcesi disvastigi pli kaj pli Esperanton.



Denove, bonan kaj prosperan kaj feliĉan Novan Jaron de *via Bulteno-redaktantino Elda Doerfler!*

Jara Asembleo de TEA la 12an de januaro 2003

Antaŭ sia malferma raporto, TEA-prezidanto rememoras al la kunvenintoj la asociojn, mortintajn fine de 2002 kaj komence de 2003. “... En novembro forpasis Carlo de Manzini, kiu, malgraŭ loĝanta en fora Japanio, ĉiam restis proksima al nia asocio; en decembro Norina Cijan, fervora besto-protektanto kaj firma Esperanto-disvastiganto; kaj en januaro Vittorio Malaroda, nia kara Tojo, kiun certe neniu el ni povos forgesi pro ties verva parolemo kaj karakteriza deklamado de poeziaĵoj de Trilussa. Ĉiu el ili estis tre bone konataj de ni ĉiuj kaj ĉiu el ili restos daŭre en nia menso kaj en nia koro. Multon ili mankos al ni!...”

MORALA RAPORTO DE LA PREZIDANTO

Edvige Ackermann

Estimataj Asocioj, karaj Geamikoj, plua jaro forpasis kaj ni estas ankoraŭ en tiu ĉi sidejo por priparoli nian estontecon, sed mi povas tion diri, ke tio okazos lastan fojon. Jes, miaj karaj, tiu ĉi estas la lasta jarkunveno en *via Crispi 43*.

Tre ĝoje kaj fiere mi anoncas al ĉiuj, ke nova sidejo

atendas nin kaj kun ĝi novaj defioj, novaj agadoj kaj atingoj, kun pli da entuziasmo ol antaŭe, kun pli da optimismo ol en la lastaj tempoj. Ĝi troviĝas en *via Coroneo 15*, je 3^a etaĝo, bezonas iom da preparado por gastigi nin kaj niajn aĵojn, kion kelkaj bonvoluloj el inter ni faros en la venontaj tagoj. Translokiĝo okazos tre baldaŭ: antaŭ la fino de ĉi monato ni estos tie kaj kompreneble via kunlaboro kaj helpo estas nepre bezonataj por aranĝi bone nian novan hejmon kaj poste reaktiviĝi pompe kaj impone. Bonegaj agadplanoj jam pretiĝis kaj atendas nur realigadon.

En tiu ĉi nuna sidejo de *via Crispi 43*, ni gastis ekde aprilo 1988: tio estas pli-malpli entute 14 jaroj. Multon ni sukcesis realigi, kvankam ni estus povintaj eble fari pli kaj pli bone. Bedaŭrinde ĉiam mankis io: ĉu homoj por agado, ĉu mono por realigado, ĉu tempo por prilaborado. Entuziasmo kaj emo tamen abundis kaj tio helpis.

Liston de ĉio farita mi ne preparis, ĝi estus tro longa kaj verŝajne nekompleta, ĉar ne facilas memori tiom da okazintaĵoj, tamen permesu ke mi menciu almenaŭ kelkajn. En la lastaj du jaroj ni bone sukcesis organizi elstarajn aranĝojn, sed ankaŭ en la antaŭaj jaroj ni tre bone laboris kaj tio kontribuis al akiro de prestiĝo kaj financa subteno flanke de publikaj instancoj. Mi menciu rapide la plej gravajn aranĝojn organizitajn dum nia restado ĉi tie en *via Crispi 43*:

- 1989 – Filatela Ekspozicio en TEA
- 1991 – Publika prelego memore de d-ro Italo Chiussi, triesta esperantisto, tradukinto de LA NOBLA KORANO
- 1992 – Presentado de la itallingva biografia libro pri Zamenhof *UNA VOCE PER IL MONDO* de Vitaliano Lambertini; Ekspozicio de rusaj afiŝoj en Triesto kaj *Monfalcone*
- 1993 – Okaze de SIA, akcepto de diverslanda delegacio fare de urbestra reprezentanto ĉe triesta urbodomo; Seminarioj pri ESPERANTO KOMERCA AGADO en *Pécs* (HU) kaj *Pineto* (IT)
- 1994 – 6^a Konferenco de esperantistoj de Alp-Adrio kun speciala porokaza filatela stampo
- 1995 – 4^a Mediteranea Konferenco de esperantologio
- 1996 – 6^a Aŭtuna Seminario kunlabore kun Itala Esperanto-Junularo; Ekspozicio por la 90^a datreveno de la fondiĝo de TEA
- 1997 – Ekspozicio de akvareloj de la hungara esperantisto-pentristo, Janos Tóth ĉe fama galerio; Seminario por instruistoj laŭ Cseh-metodo
- 1998 – En *Lignano Sabbiadoro*: 10^a Konferenco de esperantistoj de Alp-Adrio kunlige al Seminario por instruistoj de Esperanto; kaj, kunlabore kun Itala Esperanto-Junularo, 22^a Internacia Paska Festivalo. En Triesto: Internacia Konferenco – OSIEK

1999 – Ekspozicio de desegnaĵoj de triestaj elementlernejoj, partoprenintaj internacian konkurson en la pola urbo Milanówek

2001 – Prezento de muzik-dancaj ensembloj el Pollando en Triesto, *Dolina* kaj *Udine*; 70^a Itala kongreso de Esperanto kun pokaza filatela stampo

2002 – Semajno de Internacia Amikeco: Publika prezento de poeziaĵoj kaj muziko ĉe la salono de Germana Bonfara Instituto; Plantado de oliv-arbo en Istrio; Partopreno per informa stando, kune kun Centro Unesko de Triesto, en la regatto “Barcolana”; Filatela ekspozicio ĉe la Centra Poŝtoŝicejo.

(...) Kaj ni ne forgesu LA ETAN GAZETON, kiun ni eldonis de aprilo 1989 ĝis decembro 1997, entute preskaŭ 8 jaroj. Ekde tiam, tute modeste, TEA-BULTENO informas vin kaj multajn aliajn pri diversaj okazintaĵoj tra la mondo.

Jes, ni aktivis multe kaj plurfacete. Nia TEA estas konata en la mondo, kiel ankaŭ iuj ĝiaj asocioj, kaj ĝuas tre bonan reputacion, sed la nombro de ĝiaj membroj ne estas kontentiga: ni bezonas novajn fortojn por daŭrigi nian laboron favore al la internacia lingvo esperanto. La unua granda defio kiu atendas nin ĉe la nova sidejo estas ĝuste tiu ĉi: pligrandigi la nombron de niaj membroj. Nur tiamaniere ni povos progresi kaj rikolti sukcesojn. Kaj la dua granda defio estas la agado. Nur pere de ĝi ni sukcesos pluvivi kaj prosperi.

Al vi ĉiuj mi petas kunlaboron en ĉiuj sektoroj: prizorgado de la sidejo, partopreno en la programoj, preparo de programoj, ordigado de biblioteko, de arkivo, de fotografia arkivo, de gazetara artikol-kolekto, de diapositiva arkivo, de videofila kolekto. Kaj plue: organizo de ekskursoj, de vizitoj al muzeoj, de interŝanĝo de programoj kun aliaj kulturaj asocioj... Estas multo por fari, por ĉiaj gustoj, kapabloj kaj eblecoj: anonciĝu, diru pri kio vi ŝatus okupiĝi, nur tiamaniere nia TEA progresos kaj nur tiamaniere oni pravigos la flegadon de nova sidejo. Vi ja povas imagi ke la kostoj por tio ĉi estas altaj, kaj - kredo - tiaj estis ankaŭ en *via Crispi 43*, sed nun ordigo de la ĉambroj, la translokigo de niaj aĵoj kaj la necesaj elspezoj ligitaj al ĉio ĉi, ne estos sensignifaj. Estas tasko de la membroj kovri tiujn kostojn kaj se ni ĉiuj kontribuos laŭ propraj eblecoj, kun atento kaj malavareco, la tuto fariĝos pli facila kaj simpla.

Mi invitas vin do al plua, eksterordinara subteno al

AGADRAPORTO DE LA SEKRETARIO POR LA 2002^A JARO

Elda Doerfler

Kara TEA-Anaro!

Se en la pasinta jaro nia agado estis direktata al organizado kaj okazigo de la 70^a Itala Kongreso, ĉijare ni strebis por du tute diversaj aranĝoj, kiuj, certe ne samgrade kaj tiel streĉiĝe, tamen same postulis de la taskigitaj, ene de la tuta jaro, atentan kaj zorgan prilaboradon, nome mi parolas pri la informa budo okaze de la velbota konkurso BARCOLANA kaj pri la filatela ekspozicio, ambaŭ okazintaj en la monato de oktobro.

Por la aranĝo de la stando, starigita ekde la 10^a ĝis la 13^a de oktobro kaj kundividita kun CENTRO UNESKO de Triesto, oni pretigis informilojn en pluraj lingvoj, eĉ en nia dialekto, kiuj estis disdonataj je miloj da. Estis

prezentata televide, plurfoje dum la tago, la videobendo MAZI EN GONDOLANDO, kio altiris sufiĉe la atenton de la publiko, dum alterne TEA-asocioj kaj Gianfranco Tomba el Bolonjo deĵoris tuttage ĝis malfrue vespere, alparolante la preterpasantojn kaj propagandante la lingvon. En la stando ĉiam ĉeestis du, tri, kaj eĉ pli da personoj, por permesi ripozon al la laŭvicigantoj. Do, oni devas diri, ke pluregaj TEA-anoj metis sin je dispono por tiu foje tre peza laboro: ni danku ilin per varma aplaŭdo! Antaŭ ol mi forgesu: partoprenis en la regatto boato, sur kies flanko estis ligita grandega, verda tolaĵo kun jena skribaĵo blanklitera: Esperanto – Trieste. Ĝin faris nia oficiala kudristino, Amalia. Ĉu ĝi estis rimarkita de iu ajn dum la konkurso, ni ne scias, tamen ni povas fiere aserti: “Ankaŭ tie ni estis!”

Tuj post BARCOLANA, estis pretigita en la Centra Poŝtoŝicejo la ekspozicio FILATELO – HISTORIO – ESPERANTO, kiu estis inaŭgurita la 17^{an} de oktobro kaj daŭris ĝis la 9^a de novembro. En la inaŭguro, ĉeeste de reprezentanto de la Poŝtoŝiceja direkto, de ĵurnalisto-filatelisto, kiu komentis la ekspozicion, kaj de nia prezidanto, partoprenis ĵurnalistoj de TRIESTE OGGI, TELE4 kaj ANTENNA3 kun kameraistoj, tiel ke eblis legi artikolojn en la ĵurnalo kaj spekti du diversajn televidraportojn. Pli poste, je la fino de la ekspozicia periodo, ankaŭ la tagĵurnalo IL PICCOLO aperigis sufiĉe ampleksan artikolon kun fotoj.

Interese estas, ke kiam oni priskribas la laborojn faritajn, ĉio estas fine rakontata per unu, du, maksimume tri linioj, tial ŝajnas ke la tuto postulis tre malmulte da laboro, tre malmulte da tempo kaj sindediĉo. Male, por ambaŭ organizadoj, pluraj el ni estis daŭre okupataj dum multaj monatoj, eĉ jam ekde la antaŭa jaro, por ke ĉio estu preta ĝustatempe. Kaj sen paroli pri malhelpaĵoj, lastmomentaj komplikaĵoj, kiel ekzemple por la ekspozicio, kiam la direktorino, unu semajnon antaŭe, informis nin, ke ne plu eblas starigi la elmontradon en la centra salono. Tio signifis duoblan laboron, dufojan transportadon de la pezaj ekspoziciaj vitrinoj, de unu etaĝo al alia: kaj ĉio ĉi estis nur unu el la diversaj problemoj alfrontitaj kaj dume solvitaj.

Ĉi tiuj la ĉefajoj dum la jaro 2002^a de nia TEA. Kaj nun ni vidu, kiel disvolviĝis la ordinara en- kaj eksterkluba aktivaĵo.

Enklubaj programoj Dum la vendredaj vesperoj, okazis plurfojaj projekciadoj de diapositivaj pri diversaj aranĝoj kaj pri triestaj esperantistoj fare de Anita kaj pri Brazilo kaj UK en Fortaleza, de Elda kaj Edvige. Eblis aŭskulti prelegojn de Afrodita Cionchin pri Rumanio, legadojn de biografio de japana esperantisto, de prelego de H. Tonkin kaj pri primitiva nombrado, fare de Edvige, komentojn pri okazaĵoj en Esperantujo, kaj - de tempo al tempo - eblis ankaŭ distriĝi per kartludado.

Dum la decembra monato oni festis, kiel tradicie, antaŭkristnaske kaj antaŭ la jarfino: bona okazo por kunestadi, preparoli pri la estonteco de nia TEA, kaj revidi karajn amikojn, kiuj malofte havas eblon viziti nin, nome ges-roj Sudec. Kaj per la jarfina tostado oni fermis la agadon de la jaro 2002.

Dum la jaro vizitis nin samideanoj Janek Bender el Germanio kaj Glauco Corrado el Milano. Fine de julio

alvenis en Triesto grupo da estonoj kies gvidanto estis esperantistino: pri la tuta grupo okupiĝis dum ties restado en nia urbo la jam sperta ĉiĉerono Elio Nocent.

Eksterklubaj programoj Plurfoje ni estis en Udine, kie okazis diversaj interesaj programoj: okaze de SIA, la 23^{an} de februaro, vizito de Orgenfabriko kaj prelego pri "Lingvoj en la mondo" de Romano Bolognesi; la 19^{an} de majo Di-servo; la 5^{an} de aprilo kaj 24^{an} de majo, prelegoj de prof-ro Giordano Formizzi.

Dimanĉon la 17^{an} de marto ni vizitis samideanon Marcelo Trampuh, kiu loĝas en Kaŝtelir, Istrio. Li invitis nin por ĉiĉeronado en la bela Poreĉ, komuna, abunda tagmanĝo majstre preparita de la edzino, kaj plantado de olivarbo, simbolo de paco, honore al la gastoj triestaj, germana kaj aŭstralia. Pri la tuto aperis artikoloj en la lokaj ĵurnaloj.

La 22^{an} de junio nombra grupo da TEA-anoj partoprenis en la 10^a MARŜADO DE LA SOMERA SOLSTICO: temis pri 9-kilometra kurado sub stela, nokta ĉielo, kun starto de la Maria Templo kaj alveno samloka. La marŝemuloj eĉ gajnis belan pokalon.

Tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj

Semajno de Internacia Amikeco. Dimanĉon matene, la 17^{an} de februaro oni festis la Semajnon ĉe Germana Bonfara Instituto. En la programo legado de poeziaĵoj en diversaj lingvoj, skeĉoj esperantlingvaj de la kursaninoj de Marija Beloŝeviĉ el Zagrebo kaj kantoj de la virinvoĉa koruso IVAN GRBEC. Ĉio estis brile prezentita de Edvige Ackermann kaj Elena Zerpini. Okaze de tiu aranĝo estis donacita memoraĵo al la reprezentanto de la Asocio 13 CASADE, kiu grave kontribuis al la inaŭguro de la pasintjara Itala Kongreso. Por tiu manifestacio estis preparita belaspekta itallingva prospekto, enhavanta klarigojn pri Esperanto kaj SIA, kaj la tutan programon.

Festo de Amikeco sur Monte Forno. Nia kutima rendezvuo, surpinte de la monto, okazis la 8^{an} de septembro: kuntostis je universala amikeco esperantistoj el Triesto kaj Ljubljana.

Pri kongresoj/konferencoj. Dumjare triestanoj ĉeestis la jenajn aranĝojn: maje, 14^{an} Alp-Adrian Esperanto-Konferencon en Kostrena-Rijeka; julie, UK-on en Fortaleza – Brazilo kaj aŭguste, 5^{an} Eŭrop-unian Esperanto-Kongreson en Verona.

Pri ekstera informado Por propagandi la diversajn manifestaciojn/aranĝojn, estis dissendataj plurfoje dum la jaro kaj anoncoj kaj raportoj al lokaj ĵurnaloj, radioj kaj televido. En interreto ekzistas du diversaj ejoj, kie eblas ricevi informojn pri Triesta Esperanto-Asocio: unu estas <http://arte.triesteincontra.it/esperanto> kaj la alia <http://www.angelfire.com/ak/teatea> - ankaŭ tiaj estas formoj de taŭga, tre aktuala reklamado. Ambaŭ estas zorgitaj de Edvige. Plie ŝi tradukis esperanten diversajn tekstojn de plurlingva ejo pri Triesto, nome www.triestemia.com. Elio Nocent estis intervjuita pri Esperanto la 17^{an} de septembro ĉe RAIUNO, enkadre de programoj de Friulo-Julvenetio, dum Edvige estis intervjuita de TELE4 por la programo «Quattro chiacchere» la 30^{an} de oktobro.

Hanno detto dell'Esperanto... S. PIO X (Papa Sarto): L'Esperanto ha un grande avvenire innanzi a sè.

Rezultoj de la balotado okazinta dum la Jarasembleo

La gvidantaro de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO por la jaro 2003 konsistas el la jenaj personoj:

Estraro

Ackermann Edvige - *prezidanto*

Zerpini Elena - *vicprezidanto*

Doerfler Elda - *sekretario*

Valle Giuseppe - *kasisto*

Rosati Maria - *konsilanto*

Administrataj revizoroj

Nocent Elio kaj Zerpini Amalia



Rekomendo de la Asembleo

Dum la pritrakto de diversaj, estis farita la propono plialtigi la jaran membro-kotizon. Pluraj kontraŭis, nur kelkaj favoris: anstataŭe, iu sugestis, ke oni alvoku la asociojn subteni finance TEA-n en ĉi tiu eksterordinare malfacila momento, per monsumo fiksita je 100 eŭroj. **La fina decido estas, ke laŭ propraj ebloj kaj emo ĉiu el ni mone kontribuu al la elspezoj eltenotaj pro ŝanĝo de sidejo, farbado kaj purigado de la novaj lokaloj, k.s.**

Vortoj de la Redakcio

Tea-Bulteno aperos regule kaj akurate komence de ĉiu dua monato, kiel en la pasinta jaro. Programoj estos, laŭeble, dumonataj: se tiel ne estos, vi povos informiĝi ĉe TEA-sekretario, ĉiun mardon kaj ĉiun vendredon, ekde la 19^a horo ĝis la 22^a, telefone je la sama numero kiel antaŭe, persone en Via Coroneo 15, 3^a etaĝo.

Lundon la 27^{an} de januaro okazos la translokiĝo, tial ekde tiu tago oni kunvenos en la nova sidejo.

Malgraŭ la multaj laboroj farendaj, ni klopodas samtempe daŭrigi la normalan aktivecon kaj agadon, precipe rilate la festadon de SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO. Interesa programo disvolviĝos vendrede la 21^{an} de februaro, en la teatra Salono de Germana Bonfara Instituto. Temo estos: MEZEŬROPO: NIA HEJMO. Antaŭviditaj muzikprogramoj kaj prelegoj pri la kulturo, literaturo, muziko kaj tradicioj de la popoloj loĝantaj en tiu ideala teritorio nomata Mezeŭropo: ĉeestos i.a. Spomenka Ŝtimec. Tiu ĉi la provizora programo: pri detaloj informiĝu ĝustatempe ĉe TEA-sekretario.

GRATULEGOJN AL KARL' BEHMANN!

Trakuris tutan Esperantujon la eksterordinara anonco de la fervora esperantisto Karl' Behmann: finfine, post pli ol kvar jaroj da klopodado kaj amaso da leteroj aperintaj en la itala kaj germana gazetaro, kolektitaj subskriboj de pli ol 400 samurbanoj, la komunuma administracio decidis, ke ankaŭ en Bolzano/Bozen urba strato estu oficiale nomita laŭ ESPERANTO!!!

Tiu multjara laboro meritas grandegan aplaŭdon de ni ĉiuj kaj krome kiam estos la oficiala „bapta“ ceremonio, ni ĉiuj iru nombregaj al Bolzano, por ĝoji kune kun s-ro Behmann ĉi tiun lian meritatan venkon!

Kribretante tiel kaj tiel... Pier Giorgio Soranzo

Lastatempe mi aĉetis la novan vortaron de Esperanto, kies nomo estas "PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO", kutime nomata PIV. Tuj mi volis kompari ĝin kun la malnova PIV de 1970.

La unua, okulfrapa diferenco konsistas el la koloro de la kovrilo: tiu de la nova PIV estas ruĝkolora kaj ne verda, kiel tiu de la eldono de 1970. Ĉu temas pri politika aludo?

La dua, estas la pezo: la malnova PIV estas 1350 g peza, dum la nova 1550 g.

La tria, estas ke en la nova PIV la bildoj aperas interne de la vortaro, sub la nomo de la priskribita vorto, kaj ne ĉe la fino de la vortaro.

La kvara diferenco konsistas el nombro de la paĝoj: la malnova PIV havas 1300 paĝojn, inkluzive de 87 dediĉitajn al la bildoj; la nova, nur ... 1264! Inkluzive de la bildoj, kiuj aperas interne de la klarigata termino.

La ekstera formato estas iomete diferenca: la nova 24,5 x 15,00 x 5,5 cm; la malnova: 20,00 x 14,5 x 5,5 (longo, larĝo, alto).

La kapvortoj de la nova PIV estas 16.780 kaj la leksi-kaj unuoj 46.890; tiuj de la malnova ne estas cititaj. La nova PIV estas ĝisdatigita, do oni indikis per "ark" la terminojn eksmodiĝintajn (elektuario, veronalo ks), sed oni aldonis novajn (aidoso, priono, legionelo, spirulino, blasto, metadono, kvarko, ekosistemo, ciklosporino, purino ka), tre uzatajn kaj nepre necesajn al kleruloj. Oni ankaŭ forigis terminojn tro fakajn aŭ neutilajn por verko kia PIV (dionino, introrsa, perhidrolo ks). Ĉefe en botaniko oni enkondukis nomojn de ne-eŭropaj vegetaĵoj (aŭkumeno, kataranto ktp) kaj oni enkondukis plurajn prifungajn anatomiajn terminojn (kurteno 4, stipingo, vualo 2) kaj novajn nomojn de fungoj (higroforo, lepioto, rusulo ks). Interesa estas ankaŭ la venko de la plej uzata formo "komputilo" super la eksmodaj terminoj "komputero" kaj "komputoro", pri kiuj oni multe batalis.

Oni klarigis ankaŭ la distingon inter "radiko" kaj "radikalo", dank' al kio nun eblas distingi du kemiajn nociojn konfuzitajn en la malnova PIV. Sed ioma pli profunda tralegado evidentigas multajn preserarojn.

EVENTO: paĝo 306. Ĝi devus esti kapvorto, male ĝi estas miksitaj sub la vorto "evemero".

GOLO: oni parolas nur pri "pilko", sed oni golas ankaŭ per aliaj aferoj. Ekz. En la glaciĥokeo oni uzas diskon. Ĉirilate, aperas nomoj de pilkoludoj: piedpilko, manpilko, flugopilko, bazopilko. Ŝajnas, ke oni parolas pri diversaj specoj de pilkoj, male temas pri diversaj specoj de ludoj. Do, estus korekte paroli pri "piedpilkludo, manpilkludo, flugopilkludo".

LA -Ŭ finajaj adverboj estas nun nomataj "partikuloj" (ekz. almenaŭ, ankoraŭ ka), kio lasis min konfuzita.

PRESERAROJ kuŝas dise:

Paĝo	Vorto	Erare	Korekte
80	Ameriko	Cent-	Centr-
138	banala	ordinare	ordinara
180	burgundo	E. Gaŭlio	E Gaŭlio (sen punkto)
187	centavo	krujzero	kruzejro
210	ĉi/o	-faranto	-ofaranto

Paĝo	Vorto	Erare	Korekte
213	Paĝokape	ĉuvaŝo	ĉuvaŝo
213	Ĉopero	2,5 milionoj j.	2,5 milionoj da j
265	Edentatoj	Xenartroj	Ksenartroj
350	Unua paĝovorto	Floro	foko
445	Unua paĝovorto	Koko	Hoko
499	Jokto	Kviniliono	Kvariliono
500	Jota	Kviniliono	Kvariliono
702	Sub "majorano"	Cipro	Kipro
1204	Usono	Nord-Ameriko	(sen Nord)
1056	Sub "skulpturo"	skuptarto	skulptarto
1252	Zepto	Kvariliono	Triiliono
1252	Zeta	Kvariliono	Triiliono
1262	Listo C.	Agentino	Argentino
1263	Listo C.	La vorto Libano aperas dufoje: forigu unu.	
1264	Listo C.	Turkmenio: TM korekta; TU nekorekta, do forigenda.	

Sed, kiel kutime, nur la konstanta uzado de la nova PIV malkovros aliajn aldonindajn korektaĵojn. Por tion fari, oni devas esence dediĉi sin al la verkado, al la tradukado, al la legado. Por la "Eterna Komencanto" sufiĉas eĉ la vortareto kiu troviĝas fine de ĉiu libro pri unuagrada kurso, sed ne estas tiu ĉi la celo de nia lingvo, ĉar ni devas ĝin funde lerni por ĝin disvastigi.

SOLVO DE LA KVIZO

aperinta en la pasinta TEA-Bulteno

- Kiel nomiĝis la edzino de L. L. Zamenhof? *Klara Zilbernik*
 - Kia estas la nomo de la biblioteko de UEA? *Biblioteko Hector Hodler*
 - Kiuj kaŭzis la IDO-skismon? *Couturat kaj de Beaufront*
 - Kun kiu fondis Andreo Cseh la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto en Nederlando? *Gesinjoj Insbrucker*
- ****La belan, interesan, promesitan premion NENIU gajnis, ĉar neniu kuraĝis sendi al ni la solvon de la kvizo: nu, malbone por vi, vi ne scias kion vi perdis! Ĝis la venonta kvizo!****

1^A KVIZO DE LA JARO 2003

- Kion signifas la mallongigo INA?
 - Internacia Naturkuraca Asocio
 - Internacia Naturista Asocio
 - Interna Nomenklatura Apliko
 - Kiun poemon deklamis D-ro L. L. Zamenhof dum sia unua kongresa parolado?
 - La espero
 - Mia penso
 - Preĝo sub la verda standardo
 - En kiu urbo estas Internacia Esperanto-Muzeo?
 - Vieno, Aŭstrio
 - Bjalistoko, Pollando
 - Roterdamo, Nederlando
- PREMIO LOTUMOTA: NI ATENDAS VIAJN SOLVOJN!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste tel/fakso: +39 040 763128 Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it http://arte.triesteincontra.it/esperanto Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italia Poŝtĉekkonto N° 10834349
--